



Monumento al I.A.Gonĉarov en Uljanovsk
(skulptisto A.Vetrov) kaj



Malnova Gonĉarov-laŭbo en Vinnovskij parko



en Dimitrovgrad (skulptisto I.Zamedjanskij)



Tiamaniere ĝi aspektas nun


Aŭtoroj: Olga Sirotnina, Olga Gaŝneva



Ivan Aleksandroviĉ Gonĉarov

Urba
Esperanto-klubo
100 jaroj





Ivan Aleksandroviĉ Gonĉarov naskiĝis en Simbirsk la 6-an (18) de junio 1812 en familio de komercisto. Unuafoje li entreprenis la literaturan agadon dum universitatjaroj, kaj la plej signifan sukceson donis al li tri famaj romanoj: “Kutima historio”, “Oblomov” kaj “La abismo”.

Nun la memoron pri tiu granda verkisto oni zorge gardas en lia patrolando. La domo de Gonĉarov fariĝis muzeo, kiu konatigas siajn vizitantojn kun vivo de lia fama loĝanto, lia familio kaj liaj samtempuloj, ekzemple tie estas angulo de Oblomov kun nepra divano, ĥalato kaj araneaj retoj. La fama domo kun horloĝo, kiu ĉiam montras ĝustan tempon iĝis simbolo de nia urbo. En Uljanovsk kaj Dimitrovgrad estas starigitaj monumentoj al Gonĉarov, kaj belforman laŭbon sur bordo de Volga oni konsideras kiel rendevulokon de liaj herooj. Liaj verkoj estas prezentataj en la Uljanovska drama teatro, kaj certe legataj kun granda intereso kaj plezuro.



Nuna aspekto de la domo. Ĉi tie lokiĝas Gonĉarov-muzeo

Simbirsk ne estis nur patrio de la granda verkisto, sed ankaŭ de lia la plej populara heroo – I.I.Oblomov. Eĉ L.N.Tolstoj notis, ke “Oblomov” havas sukceson ne hazardan kaj ne efemeran”. Precipe en la urbo, kie loĝas ĝisnune sekvantoj se ne posteuloj de Ilja Iljiĉ.

Vivo ŝanĝiĝas, ĝia movo akceliĝas, tempo de romantikaj pigruloj delonge dronis en la eterna forgeso. En moderna mondo, tumultema kaj impetega, ne estas loko por kontemplema pigreco.



Monumento al Gonĉarov (skulptisto L.Pisarevskij)

Kia sintrompo! Tiu loko ekzistas, kaj eĉ ne sola. Ĝardeno de Oblomov estas la plej ŝatata promenadloko de pigru... pardonu, ripozantoj de la urbo. Kaj la plej bravaj ripozantoj atencas sanktaĵon. Bedaŭrinde la faman divanon de Oblomov en muzeo de Gonĉarov oni povas nur rigardi, tamen en parko de Gonĉarov staras alia divano, pli granda, sur kiu vi povas komforte sidi aŭ kuŝi. Vi povas ankaŭ almezuri pantoflojn de Oblomov por pli bone kompreni la karakteron de ilia fama mastro. Do, kial ne? Finfine en ĉiu moderna homo devas esti almenaŭ malgranda ero de romantika pigrulo.

Ĉu vere?

